



8-6-1974

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73 Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090

70.000 - Brasília (DF)

CGC Nº

00406 504/1000-06

BOLETIM Nº 35

MAIO DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

REDAÇÃO: MARIA ALMADA

LA LATINAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO EN MARILJA (SP).

Okazos de la 17-a ĝis la 22-a de julio 1978 la granda renkontiĝo de latinamerikanoj en Brazilo, ŝtato San-Paŭlo.

Ĝis nun la intereso pri la evento estas surpriziga. El pluraj landoj de Sud-Ameriko partoprenos ĝin amaso da interesatoj. El aliaj landoj, kiel Usono kaj Eŭropo, sed la plej multe laŭ enskriboj estas la brazilanoj mem, nia anaro.

La Kongresa Komitato fortostreĉe klopodas ju pli bone organizi ĝin; ke la kongresanoj estu kontentaj. Troviĝos je dispono de la ĉeestantoj senpaga loĝejo por ĉirkaŭ tricent personoj. Specialaj aŭtobusoj transportos el San-Paŭlo ĝis Marilja kaj reen la kongresanojn, kiuj bezonos transportilojn. La hoteloj estas multnombraj, do gastejoj ne mankas. Same ne mankas gastameco de la brazilanoj ĉe la unua granda renkontiĝo de esperantistoj en Latinameriko. La urbestro kune kun la turisma oficejo faros la eblon igi neforgesebla la viziton en Marilja.

La I-a Latinamerika Kongreso estas la heroldo de la Universala Kongreso de Esperanto en Brazilo.

La prezidanto de la organiza komitato estas nia vicprezidanto prof-ro Wilson Ferreira Martins, kiu kune kun la ĝenerala sekretario de BKE, s-ano Nelson Pereira

de Souza, ankaŭ instruisto pri Esperanto, en la nomo de Brazila Konsilantaro de Esperanto, petis monhelpon al Ministerio Pri Edukado kaj Kulturo. La monsumo, laŭ informo de la Ministerio al prezidanto de BKE, F.S.Almada, estis disponigita al Kongresa Komitato en Marilja, ĉe Banko do Brazilo.

Dank' al la laboro de la Konsilantaro ni sukcesos okazigi eĉ la UK'on en Brazilo. Nome Prof-ro Almada estis la unua, kiu kontaktis la Universalan Esperanto-Asociacion celante okazigi UK'on en Brazilo, kiu ja efektiviĝos en la jaro 1981-a, en nia ĉefurbo Brazilio.

En la jaro 1976-a, unuanime apogis la inviton de UK por Brazilo la jenaj reprezentantoj: F-ino Elvira Fontes, prezidantino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, Prof-ro F.S.Almada, prezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto, Prof-ro Nelson Pereira de Souza, prezidanto de Brazilia Esperanto-Asocio, s-ano Onésimo Faria, prezidanto de Instituto Esperanto de Educação, kaj singarde la reprezentanto de UEA, D-ro Braz Cosenza, prezidanto de la Kultura Koopeativo de Esperantistoj, kio finfine estis konfirmata de la guberniestro de da Federacia Distrikto, D-ro Serejo Faria.

Dum la Latinamerika Kongreso estos ankaŭ lotumado de valoraj libroj kaj aliaj esperantaĵoj.

SOROCABA (SP) — La 30-an de aprilo pasinta realiĝis en Sorocaba regiona renkontiĝo de esperantistoj, kiu aspektis vera seminario.

Nia ĉiam diligenta vicprezidentino Elvira Fontes, kiel prezidentino de San-Paŭlo Esperanto-Asocio, kiu de tempo al tempo promocias regionajn renkontiĝojn, kune kun nia vicprezidento el Sorocaba, Manoel Blaz Garcia, kaj Eluizio Bueno Rodrigues, prezidento de Sorocaba esperanto-Klubo, organizis la renkontiĝon, al kiu partoprenis ĉirkaŭ 120 personoj. La evento celis disvastigi Esperanton en tiu bela regiono, varbi novajn adeptojn al nia movado kaj propagandi pri la I-a Latinamerika Kongreso, kion nia vicprezidento Wilson Ferreira Martins eluzis kun granda sukceso.

Ni devas elstarigi la ĉeeston de la deputito Osiro Silveira, kiu disdonis interesan kalendaron en silka tolaĵo. Tiu deputito estas fervora kunlaboranto de nia movado, kaj jam proponis plurajn leĝojn, kiuj estis aprobitaj por ni.

Brazila Konsilantaro de Esperanto estis brile reprezentita en la renkontiĝo de ĝiaj gevicprezidentoj Majoro G.A. Silva Velho, F-ino Elvira Fontes, Prof-ro Nelson Silveira, D-ro Braz Cosenza, Prof-ro Wanderley Perez (Indaiatuba) Wilson Ferreira Martins (Marilja), Manoel Blaz Garcia, D-ro Walter Francini, José Dias Pinto kaj aliaj.

S-ano Silva Velho, kiel Ĉiam faris grandan kaj tre utilan propagandon en naciaj gazetoj pri Esperanto. Dank' al klopodo lia, vigligis la movado en Caçapava, Taubaté, Sumaré, Itu, Jundiaí, Promissão, Bastos kaj tra la tuta N.E. de San-Paŭlo. Li estas la plej vigla interligilo de nia BKE al la deputitaro. Krome li estas kunlaboranto de "Revista Portuguesa" en Portugalujo, kie informas pri la atingoj de nia movado ĉe la lernejoj kaj aŭtoritatuloj tra la tuta lando. Tio kuraĝigas la esperantis-taron en Portugalujo por privilegii ilian movadon, kiu jam longjare atendas oportunecon aperi en tiu ĉarma lando. La artikolo meritis la elstaran titolon "Exemploj, kiujn Brazilo donas al ni". La artikolo aperis en la lingvo portugala.

Malavare kaj sindone Silva Velho dediĉas sin entuziasme al la idealo de nia kara Majstro Zamenhof. Ni kore gratulas!

LINGVA PRIKOMENTO

(D.W.) — Argentino

Oni kutimas diri: anonci prezon por la kapo de krimulo; (premio), granda prezo = kara.1) La konjunkcio "do" montras ĉefe konkludan ligitcon kaj troviĝas ordinare post la verbo: "klopodu do, kaj vi vidos, ke vi sukcesos;" gvidu do, la kursoron vi mem sen ies helpo; vi devos do decidiĝi, ĉar vi promesis. 2) Konjunkcio montranta la surprizon: "kiom do vi postulas por la bovino? Kien do ŝi foriris?" 3) Konjunkcio uzata por insisti: Iru do, oni vin atendas; komprenu do, mian proponon; korektu do mem tiun eraron. — "Kaj... kaj" montras pli insistan kunligon de du aferoj, ol la simpla "kaj": "Mi volas aĉeti kaj la ĉevalon kaj la azenon" (nepre ilin ambaŭ). "Tuj kiam la radĉevalo komencis sub mi kapreoli mi tuj desaltis de ĝi. Prefere: "... mi tuj degletis de 1' se-lo." La frazo estas pli klara ĉar ĝi indikas, ke temas "desur". "Hodiaŭ li portis sian novan pantalonon." Ĉu li portis sian pantalonon en valizo? Tial prefere: "... li surportis sian novan pantalonon." — Oni kutime ne diras: "oni vokas vin "al" telefono", sed "ĉe" telefono". — "Lidia Zamenhof disvastigis la lingvon de sia patro kaj laboris por liaj ideoj". — En tiu ĉi frazo la vorto "liaj" estas tute bona. F-ino Zamenhof laboris ne por siaj propraj ideoj, sed por la ideoj de la patro. Do, por "liaj ideoj". "Tiu karto, nepre persona, povas esti nek pruntedonita nek vendita; tio okazigus tujan deprenon kaj juĝajn persekutojn; ĝi estos prenita ĉe la eniro en la Foiro". En tiu ĉi frazo, presita sur foira enirkarto, estas pluraj eraroj. Jen la ĝusta formo: "Ĉi tiu karto estas nepre persona. Ĝia pruntedono aŭ vendo kaŭzus tujan forprenon kaj juĝan persekuton. Ĉe la eniro en la Foiro ĝi estos forprenata". — Ankaŭ tio ne estas eble! La lasta vorto devas esti "eblo". Ni ne diras, ke la lakto estas "blanke" sed "blanka". Ni konsideru la subjekton "tio". — "Li meditis dum longaj horoj, sed ne taŭga ideo venis en lia kapo". — Unue, la fino de la frazo devas esti "venis en lian kapon". Due, ĉi tiu frazo, en la citita formo, signifas, ke venis ideo sed ĝi estas netaŭga. Tamen la aŭtoro intencis esprimi tion, ke ne venis ideo. Do la vorto "ne" restu antaŭ la verbo. "Ĉu ne mi pruntis monon al vi?" — En

tiu ĉi frazo la ordo de la vortoj ne estas bona, ĉar la vorto "ne" estas en malĝusta loko. Ĝi devas esti ĉi tie antaŭ la verbo. La frazo estu: "Ĉu mi ne pruntis monon al vi?" "Tie neeble oni lin trovos". Korekte: "Tie oni ne povas lin trovi". "Lia letero venis en fremdaj manoj". La lastaj vortoj de ĉi tiu frazo devas tiel soni: "... en fremdajn manojn". "La patro antaŭvidis, ke sia filo trapasos suferojn". La vorto "sia" ne estas ĝusta. La resenda pronomo "si" kaj same ĉi ties poseda formo "sia" ne povas en la frazo esti subjekto aŭ parto de la subjekto. Sed en ĉi tiu frazo la vorto "sia" estas parto de la subjekto, do malĝusta! Korekte oni diras: "ke lia filo trapasos suferojn".

☆☆☆☆☆

NI SCIIGAS...

CAMPOS (RJ) — S-ano Joel Maciel Soares, el Campos, informas nin, ke post kelkara stagnado la Esperanto-Movado en tiu progresema urbo denove vigligas kaj ke la intereso pri la internacia lingvo kreskas kun entuziasmo.

Nia vicprezidentino prof-ino Maria Luiza Bilot estas la senlaca batalanto por Zamenhofa idealo. Ŝi instruas senĉese kaj klopodas modele disvastigi Esperanton en Campos.

S-ano Maciel Soares skribis "Estas al mi granda plezuro konstati la energian laboron de nia BKE tra la tuta Brazilo, disvastiganti la internacian Lingvon. Oni dankas al ĉiuj estraranoj kaj kunlaborantoj, ĉar la afero estas tre utila al nia movado".

Estas ni, de BKE, kiuj sincere dankas la kuraĝigajn kaj afablajn vortojn de s-ano Maciel. Li helpas nin pere de sia rekono, firme daŭrigi la vojon celitan.

Krome ni dankas al prof-ino Maria Luiza Bilot, kiu ĉiujare organizas kursojn pri Esperanto kaj tiel ne permesas malaperi la movadon en Campos. Nia vicprezidentino estas unu el niaj elstaraj esperantistinoj en Brazilo. Ni gratulas ŝin kaj deziras, ke la sukceso daŭrigu.

PLANALTINA (DF) — S-ano D-ro Carlos Lima Mello informas nin, ke li intencas inviti por la jaro de nia Internacia Kongreso de Esperanto, t.e., en 1981-a, la TEJO-kongreson al Planaltina. La nova adreso de nia vicprezidentino Lima Mello:

D-ro Carlos Lima Mello - Cx. Postal N^o 7035 - Planaltina - CEP 70.600 (DF)

☆☆☆☆☆

PARAIBA DO SUL (RJ) — Informas nia vicprezidentino el Paraíba do Sul, Luiz Alberto de Oliveira, ke post kiam li faris prelegon pri la "Projekto Minerva" pluraj elementoj interesiĝis pri Esperanto kaj li sukcesis starigi kurson kun 30 gelnantoj. Ĉar li adoptis la Junulkurson, li diris, ke tiu unua instruado finiĝos en la fino de junio. Inter la junuloj inskribiĝintaj 6 jam manifestis intencon partopreni BEJO'n, kaj ke li mem, proprakoste inskribigos por la 1-a LAKE. S-ano Luiz Alberto de Oliveira ankaŭ, laŭdis la laboron de nia redaktoro pro la ĉiam interesa enhavo de nia bulteno.

☆☆☆☆☆

BONA ESPERO - ALTO PARAISO (GO) —

Nia vicprezidentino, ĉefdelegito de UEA, s-ano Giuseppe Grattapaglia, sendis al ni liston de kelkaj interesatoj pri korespondado: S-ro Karl Trimborn - FEOLL - Pohlweg 55 - 4790 PADERBORN, Federacia Respubliko Germanujo, instruisto de Esperanto, kiu serĉas adresojn de knaboj inter 9 kaj 10 jaroj. — Alina Klotz - ul. Libelta 3/16 - PL-85 080 BYDGOSZCZ - Pollando (12-jara knabino, kiu deziras korespondi per koloraj bildkartoj de bestoj). — Witold Dobrzynski - ul. L. Warynskiego 16/53 - PL 85 320 Bydgoszcz, Pollando (12-jara infano kiu deziras korespondi pri aviadil - modeloj kaj bildkartoj pri bestoj kaj panoramoj). — Koljo Petrov - Str. Kirilj Metodi 42 - 5500 LOVEČ - Bulgario (deziras korespondi kun "multaj" brazilanoj por interŝanĝi amason da aferoj: poŝtmarkoj, moneroj, bildkartoj, kalendaroj, alumentikedoj, ktp).

Nia vicprezidentino petas ankaŭ, ke tiuj kiuj aŭdas la radio-staciojn de Vatikano kaj Berno, bonvole skribu al tiuj elsendejoj informante pri la ricevo aŭ komentariante la elsendaĵojn, kio elmontras la ekziston de esperantista merkato.

☆☆☆☆☆

NITEROI (RJ) — Nia vicprezidentino An-

dré Luiz Fausto de Souza, prezidanto de KULTURA DEPARTAMENTO de BEJO, informas nin pri la "DUA ESPERANTA MUZIKFESTO" okazonta en Marília (SP) de la 17-a ĝis la 22-a de julio venonta, dum la Latinamerika Kongreso de Esperanto — : — Jen la "REGULAMENTO" — INSCRIÇÕES — Estas deverão ser feitas nas Associações mais próximas, até o dia 30 de junho. — II— No ato da inscrição deverá pagar Cr\$ 30,00 por música. —III— O concorrente deve ser sócio do BEJO. —IV— Deve o participante entregar 12 cópias datilografadas com a letra das músicas. —V— Uma cópia da música (partitura musical) ou gravação cassete, mesmo sem acompanhamento instrumental. — REGRAS — 1) As músicas (melodias) deverão ser inéditas, sem ter participado de outro concurso. 2) A presença de um dos autores é obrigatória (ou representantes) no Congresso, em Marília. 3) No máximo devem ser inscritas três músicas, com parceria ou não. 4) Cada região, igualmente, poderá levar somente três músicas à final. No caso de haver maior quantidade de músicas a Associação se reservará o direito de selecioná-las da forma que lhe convier. 5) O cantor ou cantora fica à escolha dos participantes. JULGAMENTO — 1) O Juri será composto de 10 membros, cujos nomes só serão divulgados no dia do concurso. 2) Quesitos para o julgamento das músicas: Melodia, Letra, Apresentação e Interpretação (estes dois últimos são integridades). 3) A decisão do Juri será irrevogável. Em caso de empate o voto decisivo será do Presidente escolhido. 4) Haverá um prêmio extra para a melhor pronúncia do Esperanto dentre as músicas apresentadas. Este tema será abordado fora do resultado final. 5) Não será permitida qualquer comunicação com os Jurados durante o concurso. PRÊMIOS — 1) Haverá prêmios em dinheiro e troféus para os primeiros colocados. O troféu para o vencedor será rotativo, ficando definitivamente no Estado que conseguir vencer por três vezes consecutivas ou não. 2) A

entrega dos prêmios se fará imediatamente após a decisão do Juri. 3) Os valores dos prêmios serão divulgados oportunamente.

☆☆☆☆☆

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis kaj dankas el tuta koro la jenajn gazetojn kiuj ĉiam publikigas interesajn sciigojn pri la movado esperantista en Brazilo: Boletim da Associação Pernambucana de Esperanto; "Seminário" (Bahia); "A Tarde" (Rio de Janeiro); "Rio Grande" (RS); "O.N.O.S.S.O" (SP); "Diário de Taubaté" (Taubaté); "Matutino Popular"; "Diário de Sorocaba" (SP); "Correio Fraterno" do A.B.C.(SP); "ZET", da Jugoslávia; "Meninão Santista" (Santos).

☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA — Por helpi la publikigon de nia Informa Bulteno, ni ricevis la jenajn sumojn, kiujn ni dankas al la bonkoraj donacintoj:

Hercila Valverde	100,00
Augusta Sellmeister	200,00
Nelson Silveira	300,00
Maria Almada	50,00
Dif. de livros	<u>50,00</u>
Sumo	<u>700,00</u>

☆☆☆☆☆

NOVAJ VICPREZIDANTOJ — Ni elektis kaj nomumis la jenajn vicprezidantojn, kiuj same kiel la antaŭaj nomumitaj decidis kunlaboradi kun ni en ĉiuj kampoj: Hamilton Santos, el Uberaba, kie li estas prezidanto de Uberaba Esperanto-Ligo. D-ro Lacorday Andrade, el Guarulhos, kie li estas advokato. La unua ricevis la fakon "Disvastigado de Esperanto" kaj la dua pri "Jura Afero". Ni esperas ke niaj

novaj kunlaborantoj ĉion faros por ke BKE kresku kaj progresu en Brazilo.

☆☆☆☆☆

NUM APERINTAJ — Nia kara vicprezidanto Delio Pereira de Souza sendis al ni ekzemplerojn de la lastaj eldonitaĵoj de la Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, "Survoje al la Kosma Konscio" de li tradukita el la portugala lingvo, kaj "Paroloj al miaj gefiloj" originale verkita de nia vicprezidanto D-ro Walter Francini, kies enhavoj estas legindaj. C. Postal 3133 — ZC 00 — Rio de Janeiro (RJ).

Ni ankaŭ ricevis, senditan de nia s-ano Allan Kardec A. Costa, interesan ekzempleron de instrulibro titolitan "Ilustrita Metodo de Esperanto," kies enhavo estas bele prezentata kaj tre rekomendinda por novuloj, kiuj volas rapide lerni Esperanton. Ĝi estas publikita de Spitisma Grupo "EEE", bele kompostita kaj tre alloga por komencantoj. Caixa Postal 507 — CEP 30.000 - Belo Horizonte (MG), kie oni povas mendi. Prezo: - Cr\$ 100,00. —

☆☆☆☆☆

NELSON SILVEIRA — Nia vicprezidanto pri "Literaruro", Prof-ro Nelson Silveira, naskiĝis en Santos, kie li legis en iu gazeto pri la idealo de L.L. Zamenhof, antaŭ dudek jaroj kaj ekŝatis ĝin.

Kiel altranga funkciulo de banko kaj vigla intelektulo tuj rekonis la valoron kaj bezonon de la internacia lingvo. En Esperanto-Societo de San-Paŭlo li ellernis Esperanton. Lia profesoro estis la tiama prezidanto de la Societo, Oswaldo Leite de Moraes. Ek de tiam s-ano Silveira ne ĉesis aktivi en la esperanta movado.

Li ĉiam okupis elstaran pozicion en nia Societo. Okaze de la kampanjo por aĉeti propran sidejon, li fortostreĉe kune

kun grupo de samideanoj realigis la aĉeton de la sidejo, direktante la kampanjon. Li estis elektita sekretario de la Societo kaj ĝia prezidanto.

Nuntempe li akurate kaj honeste plenumas la finanĉan agadon de la organizo kaj instruas la lingvon en ĝia sidejo.

Lia idealo estas la homara frateco, la sama de Zamenhof, kaj pro tio li eĉ kiam malsana ne forlasis la Societon kaj senĉese ĝin vizitadis ĝin helpante morale kaj mone. Same li helpas nian BKE, kion ni elkore dankas.

La kultura kapablo de nia biografiito estas nekontestebla. Liaj verkoj estas valoraj, kiujn pluraj gazetoj publikigas. Li estas kunlaboranto de "Diario Popular" (SP) kaj de diversaj spiritismaj periodaĵoj.

Ofte li faras prelegojn kaj paroladojn ĉe radio, lernejoj kaj fakultatoj.

Pro tiom da bonfaroj, pro lia frateca agado ni lin gratulas dirante: Nelson Silveira estas homo - homa.

☆☆☆☆☆

NITEROI (RJ) :- Nia kara s-ano D-ro Joaquim do Couto informis nin, ke en la pasinta 30-a de januaro 1978, Niteroi Esperanto-Klubo en ĝenerala Ordinara Asembleo elektis novan estraron kaj Kontrolan Komisionon, kies membroj estas la jenaj: Estraro: — Prez. D-ro Joaquim do Couto; Sekretariino: F-ino Balbina Ferreira; Socia Direktorino: Marlice Botelho Belleza; Financa Direktoro: Emilio Ferreira; Direktoro pri Kursoj: Zulmiro Balthazar Neves. Kontrola Komisiono: Gen. Ivan Madeira Coelho; D-ro Odilon de Beauclair kaj Leŭtenanto José Pedro Milagres. La mandato de tiu estraro estas por du jaroj. NEK - instruas Esperanton en du malsamaj kursoj: ĉe Spiritista Federacio de l'Ŝtato de Rio de Janeiro kaj ĉe UMEN, gvidataj de la instruistoj Zulmiro Balthazar Neves kaj F-ino Balbina Ferreira. Gratulon al nova estraro kaj ni deziras prosperon al NEK.

AŬTUNO

Serene parolas la aŭtun'
 Susuras foliaro dormvola,
 en malhelon sin kaŝas la sun'
 kaj la nokto silentas tutsola.

Maria Almada.

☆☆☆☆☆

La kanto de l'amo

Feliĉecon al tuta la mondo,
 Saluton al vivo ĉie en la rondo!
 Beno kaj savo estas miaj deziroj
 Por ĉiuj laŭ propraj aspiroj!

Ĉu vivaĵo aŭ estas granda aŭ eta,
 Ĉu plenpotenca aŭ malforteta,
 Ĝia daŭra feliĉo estas mia peto,

Ĉu en aero, surtere aŭ en rivereto.

Ĉu ĉi tie aŭ ne, ĉu mi ĝin vidas,

Ĉu antaŭ la piedo, aŭ ĉu ĝi rapidas

En fremda lando, ĉu ankoraŭ vivanta

Aŭ trans la limon de l'morto iranta

Savon donacu al ĉiuj vivuloj

La bensaluto de la Sanktuloj!

Kiel patrin' ŝirmas sian infan'

Kun korpo kaj vivo kaj oferpreta man',

Tiel mi amplene al mi altiras

Ĉion, kio vivas kaj vivdeziras!

La oraj radioj de l'amo senfine
 La universon tralumigu obstine.
 Ke malamo neniam malsuprentiras,
 Kiu vivas, kaj vibras kaj ĉielen aspiras!

Budho (KOS)

Budhana Ligo
 Esperantista
 D-7822 St. Blasien
 BRD - 1252

☆☆☆☆☆

BRAZILIO (DF) — Sob a responsabilidade dos srs. Enivaldo Alves Silva, Francisco Mattos de Oliveira e Nelson Pereira de Souza, a Associação Brasileira de Esperanto acaba de fundar o seu "Libro-Servo", uma espécie de clube do livro, tendo para tanto entrado em contato com 83 editores nacionais e estrangeiros. Livros em Esperanto e assinatura de revistas e jornais esperantistas já podem ser solicitados à Associação Brasileira de Esperanto — Libro-Servo, Cx.Postal Nº 07.1055 ou à Avenida W/5 — Q 909 — Módulo 29. CEP 70.000 — Brasília (DF).

☆☆☆☆☆

ESPERANTO ELEMENTAR

Continua tendo bastante aceitação o livrinho de nosso presidente "Esperanto Elementar", vendido em Santos na Livraria Atlântica, Pingo de Luz e Galeão Carvalhal 31-73; no Rio de Janeiro na Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Caixa Postal Nº 1887 — ZC 00 — CEP 20.000 Rio de Janeiro (RJ); em São Paulo na Associação Paulista de Esperanto — Av. S. João, 1333 — 2º — S. Paulo - CEP 01000 — Caixa Postal Nº 5.888. Em Uberaba à Rua Sete de Setembro, 28. CEP 38.100 — Liga Uberabense de Esperanto. Cr\$ 15,00.